

PRINCETON UNIVERSITY

JAN 26 1922



AMERIKA

ESPERANTISTO



JAN., 1922

OFFICIAL ORGAN
of
THE ESPERANTO ASSOCIATION
of
NORTH AMERICA



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO
POR TEKNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Printempa Foiro 1922 de la 5^a ĝis 11^a de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27^a de aŭgusto ĝis 2^a de septembro

La centra merkato por la internacia
komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

(Foiresficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

JOHANNES-TSCHICHOLD-130-1921

DEZIRAS KORESPONDI

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

S-ro Jonas K. Miliauskos, Dideye Vilniaus G-ve, No. 14, Kaunas, Lithuania, Europe.

Arthur A. Smith, Van Wert, Ohio, U. S. A. (Usono) deziras korespondi kun artistoj kaj forografistoj, aŭ spertuloj aŭ lernantoj, vivantaj en ia loko de la mondo.

Herbert A. Wallace, 1915 No. 13th St., Kansas City, Kans.

P. Tarnow, Duesseldorf, (Germ.). Poststr. 7, vendas sian grandan volapukan kaj esperantan bibliotekon. Sciigu al li kiujn gazetojn, librojn, ktp., vi bezonas.

Lernantinoj de la 3a gimnazia klaso (10a jaro) dez. kor. per I.P.K. kun ĉiulandaj junaj fraŭlinoj precipe kun samagaj lernantinoj. Sciigu adreson al P.A.Kolev, str. Regentska, 19, Sofia, Bulg.

ATTENTION! ESPERANTISTS!

The LLANO PUBLICATIONS

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work. It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

LLANO CO-OPERATIVE COLONY

Leesville, Louisiana.

Filatelistoj!—Sendu al mi la sufiĉan monsumon laŭ vialanda P.M. katalogo kaj mi sendos al vi la poŝtmarkojn de meza-Eŭropo, novaj ŝtatoj kaj el Ĉeĥoslovakio. Sendu samtempe vian mankoliston! Sin turnu al S-ro Miroslav Sic, Zeleny Brod, Stefanikova 35, Ĉeĥoslovakio.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

WEST NEWTON 65, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

One Dollar a Year.

Single Number 10 Cents.

Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 29.

January, 1922

No. 3.

HORACE DUTTON BOOK FUND

For a long time it has been apparent that some arrangement is needed to provide for the purchase and publication of books with funds other than those which come from present sources. Two years ago, when it was mentioned to the Reverend Horace Dutton,—one of the greatest of all the Esperanto idealists the world has known, who was ever ready to take up a duty when he saw it,—he quickly said, "I will raise a fund of a thousand dollars, and subscribe to it myself." He then prepared a statement of the needs in the form of a letter which was submitted to various Esperanto friends, one of whom signified his approval by sending in a check for \$50.00 which has helped as a "back log" to our account ever since. But the time did not seem ripe to present the matter, Dr. Dutton's health began to fail, and we lost him soon after the 1920 Congress.

The subject was presented at the Boston Congress in 1921 and was approved, the President being empowered to appoint a Committee to develop the plan.

The Committee so appointed now presents for your consideration and co-operation the Horace Dutton Book Fund. In conformity with the original plan the objects of this Fund are as follows:

1. To buy Esperanto books for sale.
2. To publish Esperanto text-books and literature for sale, that we may reap the full benefit of producing our own goods.

This Fund, while kept apart from other moneys received through membership, subscriptions to the magazine, and the guarantee fund,

will for the present be handled by the Treasurer of the Association. It will be properly safeguarded, so that it shall be used only for the purposes stated.

The first fifty dollars has already been increased from other sources to nearly two hundred dollars. One of our members has offered, when the fund has reached a certain amount, to make it up to a thousand dollars.

Subscriptions to this fund are now solicited, to be paid when and as you choose, preferably soon. Do not hesitate because you cannot contribute large sums. Make checks payable to D. O. S. Lowell, 507 Pierce Building, Boston, Mass.

D. O. S. Lowell, Chairman,
Miss E. J. Meriam,
B. Pickman Mann,
Committee.

THE PRESENT STATE OF ESPERANTO

We shall follow the outlines of Mr. Lee's valuable article in A. E. for December, 1918, but must condense, even if not satisfactory from a statistical standpoint. Such information, then painstakingly collected, may today be found more readily in various places.

Therefore we print in English.

0

Esperantujo—The grade of Esperanto activity today varies from Finland, where probably every 1000th person is a live Esperantist (of a single textbook one sold for each 4000 inhabitants—this a year ago) to the heart of Africa where only some lone missionary cherishes the green star and plants the first seeds of the age to come. In order of activity: Finland, Germany, Siberia, Russia, Britain, Bulgaria, Japan, Austria, Esthonia, Chekoslovakia, Italy, Holland, Belgium, France, Rumania, Jugoslavia, Switzerland, Hungary, Portugal, Spain, Australia, Brazil, Sweden, Lithuania, Poland, Norway, Denmark, Argentine, Canada, Usona, Cuba, Mexico, Persia, China, India, Turkey, South Africa, Central and W. South America, North Africa, and Central Africa. This is a guess-work table based on data in Esperanto magazines (these are not in themselves a criterion of local activity, as the money exchange rate has a disturbing effect), and in the U. E. A. yearbook, etc. It is one of density among the population, leaving numerical totals to the reader. Several deductions can be drawn from a comparison with Mr. Lee's table: the height of activity in Europe seems to have swung eastward. The movement in Britain, the stimulating center at the time of the Armistice, is now rivalled or surpassed by the activity and rapidity of progress from the Baltic to the Aegean. A new magazine at Constantinople and a poliglot group in Alexandria—with a score of languages—mark the extent of this advance on the south. In Bulgaria 29 public schools are paying teachers for official Esperanto courses. All the countries of the Danube are awake to the new tongue; for the eastern Baltic states Esperanto is the great culture-bringer of their new day of

mother-tongue revival. These small nations are essentially the ones in which Esperanto is not only a commercial and ideal but an immediate, everyday, home-town necessity for everybody. Germany likewise sees a great practical agent in Esperanto, for she must capture, if possible, the trade of these new states. As we get westward on the continent Esperanto seems to be more and more allied with the laboring classes and their propaganda; the sindacalists and communists and other "proletariat" elements constituting probably over $\frac{2}{3}$ of the Esperantanoj. With this important $\frac{2}{3}$ Esperanto is a practical substitute for the learning of some half dozen tongues and the ideals of Esperantism are also rife. Russia and Siberia have continued favorable to Esperanto (tho not so effectively as we hoped in the spring of 1920—the resolutions of the Soviet were rather recommendations than orders and textbooks did not exist); the schools are encouraged to teach the language and the teachers are paid a pittance where textbooks are available. The British are consolidating the progress of the past, with perhaps Liverpool and Glasgow as high spots of progress.

1

Study.—There is a marked tendency to be noted in the discussions to a change of method from one of the text-book first to one of direct speaking instruction and later grammatical finishing; articles relative thereto have appeared in several European journals, such as *Germana Esperantisto* and *E. Praktiko*. Several notable books have been issued emphasizing the direct method, such as *Bildotabuloj*, *Tra la Jaro*, and *Struvelpetro*. Another method that finds favor is by a reading book, e. g., *Setala's Legolibro*, giving but a small space at the end to the grammar, tho accompanied with a handbook for the more studiously inclined.

2

Use.—Esperanto is being used in business, to a limited extent as yet, it is true, by such firms as the *Esperanta Komerca Korporacio* of Japan, and by the seven great fairs of Europe (notably by the *Leipzig Sample Fair*), which have found that advertising in Esperanto pays. This use is as a *krom-lingvo* (additional language) along with 3 or 4 other national languages. There are many established firms that employ Esperantist clerks for Esperanto correspondence, and a considerable amount of capital is now invested in Esperanto and Esperantist publications. We hear of 8th and 10th editions of some books, which begins to look like profit-taking. Petty retail purchases thru use of Esperanto by mail also aggregate a considerable sum. Esperanto advertising pays best in cases where one has a commodity of world-wide use and local production. For example we have been told that, even in 1901, a full page illustrated advertisement in "*La Lumo*" by a harvester-machine company in the States brought an order for 15,000 harvesting machines out of Russia. The advertisements in some of our larger journals indicate that this value of advertising to reach the general, not merely the Esperantist public, is being recognized.

The uses of Esperanto in spreading propaganda of one sort or another are already well recognized. The churches are not altogether neglecting this use of Esperanto. Some of the Bahai have made journeys about other continents largely by use of Esperanto. The Sinn Fein got in a timely bit of propaganda that did something to attract the sympathies of continental Europe. Germany is doing the same with three pamphlets on Upper Silesia. The Hungarian Academy in a sharp exchange of open letters with the Chekoslovak Academy resorted to Esperanto. In fact Esperanto has become a publicity medium and translation matrix of paying value.

Nor have the established governments altogether forgotten us. The Finnish government has given a money subsidy, 25,000 Fm., both this year and last, to the Finland Esperanto Office, and the Finnish ambassador in Japan, the learned Dr. Ramstedt, world authority on the past and present tongues of Asia, is ever ready to tell in Esperanto of the glories of his "Land of a 1000 Lakes" to an eager audience of Japanese (Sometimes a Japanese translates from Esperanto—not all Japanese are as yet Esperantized). Chekoslovakia sent A. Pitlik to the Hague in 1920 to give an illustrated lecture on his country, of course in Esperanto—one reason why the 2500 kongresanoj at Praha outnumbered all expectations. The Labor Office of the League of Nations has started to issue pamphlets in Esperanto upon its work, while the delegates of the Council and Assembly are hesitating to resolute. The Esperantist secretariat of the League keeps us well informed thru its monthly in Esperanto.

Not less significant is the growing use of Esperanto in British schools as an introduction to the study of foreign languages; it seems fairly evident to us prejudiced observers that the anachronistic teaching of Latin has found a supplanter. We will grudgingly mention the constant use of doubtful Esperanto by the postage stamp dealer and collector, the bane of the Esperanto editor's life. We might call attention to the two Esperantist-conducted excursions last summer, one from Finland to Reval, the other from Scandinavia to Praha. The uses to the Esperantists themselves for correspondence, travel, and enlightened comprehension of world affairs go without saying; we shall not enumerate them.

3

Propaganda seems to have been best managed in the Balkans, where the Esperanto movement is just now sweeping all before it, where two years ago there were but a handful of live pioneers. We will quote from the November Bulgara Esperantisto, not given to exaggeration.

"By united forces, by untiring and systematic effort, by their fervor, the Bulgarian Esperantists have attained great successes in the course of a few months.... These successes must not enebriate us. Let the past instruct us..... No parading of the ideal; no loud shouting; no intrusiveness; no sonorous names of great backers are now needed, but **work**, work conscientious, unceasing, without immodesty or glory-seeking. The movement has boiled up all over the land, cities and villages in

rivalry are starting to work at Esperanto. And the Esperanto book is now already sufficiently in demand. The capitalists are stretching their ears.”

In Finland a like upboiling came in 1919 and 1920, a movement still sustained at flood. In Brazil the government looks on Esperanto with marked favor, as do practically all the eminent and learned. In the Upper Rhine district a score of newspapers have their regular weekly Esperantist columns, supplied from a central source of facts. In England the propaganda phase has perhaps somewhat given way to a thoroughgoing learning of the language, not a bad symptom. We need a large scale map indeed to locate all the U. E. A. delegates in the region about Manchester. In France three divisions along political lines maintain a somewhat forced hostility, but are growing rapidly. Sennacieca Revuo, formerly E. Laboristo, has shot up like a meteor into the sky and marks the fairly definitive choice of Esperanto by the proletariat. The Central Office in Paris and the U. E. A. Office in Geneva, despite a certain friction, have kept plugging away, one by the outspoken and practical method, the other by the silent and wire-pulling method, until it seems fairly certain that the League of Nations will at least give us a commendatory resolution (“moral backing”) when the matter comes up as per schedule next spring. We interlinguists are already strongly entrenched in the League’s office staff and translation corps. The resolutions of great “moral” value secured from the Paris and other Chambers of Commerce, and from the world’s greatest scientific societies, and from the Red Cross will no doubt help. We are glad to know that in a few cases, as in that of the Paris Chamber of Commerce, the resolutions have been backed up by introducing the study of Esperanto into the Chamber’s schools in Paris. In Portugal the propaganda has not had the hoped for results, but Catalonia with its reception of sickly Austrian children has proved and firmly established Esperantism. The Spanish government tends to suppress the use of Esperanto among radicals. Members of Esperanto groups affiliated with the German Esperantist Association have practically doubled in 1921 (for figures see December A. E.); they have devoted their magazine to propaganda almost exclusively and are reaching all classes and occupations. Russia, and Siberia especially, despite a lack of books, are thuroly alive with Esperantists, and Japan reports many new groups and members. Nearly all propaganda in the Orient seems to mix in with Esperanto and the Japanese government is perhaps a little suspicious of Esperantists. We were sorry to hear of the expulsion of the blind Russian propagandist, Eróshenko, probably for expressing his sympathies too freely. Esperanto in China has met with a heavy loss in the suicide of another Russian Esperanto propagandist, Stopani.

We must point out that the present greatest activity seems to be in exactly the strip of countries where Esperanto is most needed, the borderland states between Western Europe and the Russo-Asiatic land; here we may expect it to find firm roots as the practical medium of intercommunication.

We cannot leave the subject of propaganda without referring to the excellent progress made during the last couple of years in New York City in several directions, notably in labor, radical, and musical circles. Vancouver and Salt Lake City have also shown a marked activity as have several other localities. In Mexico and Cuba various samideanoj are sporadically but increasingly heard from. Upon the whole, however, North America is not awake from her slumber, tho locally good work has been done. Our 1922 blotter-calendar with a surrounding legend in either English, French, or Spanish, will be out in a few days, also reprints of our December article on schools, and ought to be distributed as a duty by every Esperantist in his own vicinity. **Wake up!**

4

As to how groups should be **conducted** there seems to be some disagreement upon one vital question—ought they to be conducted in Esperanto, or just for Esperanto. Sec. Lee believes in the concentrated use of Esperanto on any and all occasions; Mr. Scott and Mr. Silbernik, I understand, do not urge its use between Americans; we all of us have a back-sliding habit only natural in a one-language land, when no alilingvuloj are present. The 5th Saturday as a special propaganda day does not seem to have spread beyond Boston, tho we consider it a valuable innovation.

We note in Europe a tendency to two-evening-a-week courses; perhaps this concentration of effort into a shorter period of time gives better results. Harmonio in New York makes the evening attractive with music and dancing. The Brita Literatura kaj Debata have debates of spertuloj; the London society, essays in Esperanto; Russian clubs report many dramatic performances. The subject is well worthy of serious study, for some of our clubs now moribund might be made attractive by a change of program. Not enough is done to draw in and to draw out visiting Esperantists.

5

We shall omit extended mention of "Grammar," as it is a subject on which some are hypercritical and others undercritical, and should best be studied not here in America, but by our Lingva Komitato. We are still hoping vainly for a single Esperanto organ to give us both the news and the authoritative decisions of the L. K., without the tremendous strain on our purses now required. We suggest that the L. K. take over and enlarge the Lingvaj Problemoj department of "Esperanto," and discontinue the Oficiala Gazeto. The vexed question of -io-ujo is no nearer solution than ever, apparently, tho the divergence in theory has been whittled down pretty close, and nobody has much patience left to discuss it calmly. Perhaps the Lingva Komitato will decide. E. Triumfonta has been running an excellent critical examination of the Fundamento and F. K. from a logical standpoint—we detect an increasing insistence on logic at the expense of tradition, e. g. vort-finaĵo instead of vort-finigo. This is frequently seen in uses like kelkiu (which we don't like) and tiom instead of tia and tiel (which we approve). Still if the eminentuloj are a little inclined to licence now and then, the vast mass of us

Esperantists are sticking very closely to our text and giving the innovation scant acceptance. The opinion of the mass moves slowly—that is why the Lingva Komitato, even if a little slow and cumbersome, is the safe guide to follow.

6

Persons—are all important in the E. A. N. A., and until we become more numerous every one of us should feel that upon him alone rests perhaps the immediate future of Esperanto on this continent. Practically the movements in Finland and Bulgaria today may be said to be successful because of the bulldog insistence of one or two and the constant disinterested active aid of a few other izoluloj. Don't be a fair-weather Esperantist—Mr. Lee will give you a job.

7

Books and magazines are coming in in such numbers that we must omit mention by name. New books or booklets come about two a week (for review) and new magazines some two a month. This represents perhaps one half the output of new all-Esperanto books, but new editions or national textbooks are usually not sent us for review, so the total output must figure up to some 300 or 400 new titles and new editions per year. Somebody must read them, whether by direct purchase or at a club. There are well over one hundred periodicals now running, if we count in the mimeographed and hektographed ones, and printed ones of at least standard 16 page size are at least half that number. Esperanto Triumfonta, our weekly newspaper, has scored a remarkable triumph.

8

Instead of Mr. Lee's **Miksaĵo** I shall take up a perhaps malkonvena subject, the Esperantist's budget. If anyone wishes advice, here it is—a practical not an altruistic budget

komencanto—textbook .50	— readingbook .50	—	total \$1.00
progresinto—Amerika Esperantisto or fakgazeto—			total 1.00
komencanto—E.A.N.A. 1.00	— textbook .75	— A.E. 1.00	
	club or reading 2.25—		total 5.00
progresinto—U.E.A., m.-a. 2.50—A.E. 1.00—club or			
	reading 1.50—		total 5.00
komencanto—E.A.N.A.,ctb. m. 3.00—textbook .75—diction-			
	ary .50—club and reading 3.00—propaganda 2.75—total		10.00
progresinto—U.E.A., m.-a. 2.50—E.A.N.A., ctb. m. 3.00			
	—club. or fakg. 1.50—E. Triumfonta 3.00—		total 10.00

Anyone who can afford to devote more should attend a congress if possible. Spertuloj already know how to distribute their money so are not included. Boy Scouts or the merely interested will find our "Propaganda Packet" satisfies curiosity and gives a good start.

9

Needs—are many; two only will we mention:

We intensely need printed keys in Ĉefĉ form in Chinese, Hindustanee, and Arabic; until we have them Esperanto, in our opinion, will remain a rich man's study for over half the world.

We need a single organization to rule Esperant-lando.

GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

La princino sur pizo

Estis iam princo, kaj li deziris edziĝi kun princino; sed ŝi devus esti vera princino. Por trovi tian princinon li faris multajn kaj longajn vojaĝojn en la tuta mondo; sed ĉie, kien li venis, li renkontis jen unu jen alian malfacilaĵon. Ekzistis certe sufiĉe da princinoj, sed ĉu ili estas veraj princinoj, li ne povis tuj ekscii; ĉe ĉiu el ili li trovis ion malveran. Fine li revenis domen, kaj li tiam estis tre ĉagrena, kion oni povos bone kompreni, ĉar lia plej sincera deziro estis ja edziĝi kun vera princino.

Ian vesperon la vetero fariĝis treege malbela; fulmadis kaj ton-driskaj sencese falis de la ĉielo pluvegoj. Nun iu frapis la pordegon de la kastelo, kaj la maljuna reĝo iris por malfermi.

Ekster la pordego staris princino. Sed, ho ĉielo, kian aspekton ŝi havis! De ŝiaj haroj kaj de la vestaĵo gutegis la akvo; ĝi tute trafluis ŝiajn ŝuojn kaj elgutadis el la kalkanumo, kaj dum ŝi staris ĉi-tie en la pluvego ŝi diris, ke ŝi estas vera princino.

Nu, ĉi-tion ni facile ekscios! pensis la maljuna reĝino; ŝi nenion diris sed iris en la dormoĉambrom, kaj forpreninte la tutan litajon ŝi metis pizon sur la fundon de la lito. Si prenis nun dudek matracojn, metis ilin sur la pizon, kaj sur la matracojn ŝi plie metis dudek kusenegojn, faritajn el la plej mola lanugo, kiu ekzistas.

En ĉi-tiu lito la princino devis dormi nokte. Je l' mateno oni ŝin demandis, kiel ŝi dormis.

"Ho, malbonege!" la princino respondis, "mi preskaŭ ne ripoz-iĝis la tutan nokton, kaj mi ne komprenas, kio troviĝis en la lito."

"Mi kuŝis sur ia malmolaĵo, kaj mia tuta korpo fariĝis bruna kaj blua. Estas tre malagrabla kaj stranga okazo!"

Nun oni povis kun certeco scii, ke ŝi estas vera princino, ĉar la pizon ŝi estis eksentinta eĉ malgraŭ la dudek matracoj kaj la dudek kusenegoj kun la plej mola lanugo kiu ekzistas. Neniu ol vera princino povus posedi tian mirindan sentemecon!

Post ĉi-tio la princo edziĝis kun ŝi, ĉar li ja sciis, ke lia edzino estas vera princino, kaj la pizon oni enmetis en la muzeon de la reĝo. Tie ĝi troviĝas ankoraŭ nun se neniu ĝin forŝtelis.

El "Fabeloj de Andersen"

tradukis F. Skeel-Giorling.

Ni bezonegas la solan centran organizon longatempe proponatan, sed ŝajne timatan de la povuloj en la mondo Esperanta. Ni esperas ke la kongreso en Helsinki, kiel tiu en Boulogne-sur-mer, plenumu sian rajtan oficon kiel leĝdonanton kaj fondanton super ĉiuj aferoj Esperantaj, kaj ke la kongreso ordonu, ne petu, tian unuiĝon. Sufiĉe longatempe ni flirtadas kun la nuna anarĥi-naskonta stato; la kongreso decidu kaj niaj monuoj subtenu la kongresan decidon.

[Prujno]

FOR THE STUDENT
The Princess on a Pea

There was once a prince, and he wished to marry a princess; but she would have to be a real princess. To find such a princess he made many and long journeys thru the whole world; but everywhere he came he met one difficulty or another. There were certainly enough princesses, but whether they were real princesses he could not at once determine; in each of them he found something spurious. Finally he came back home, and he was then much put out, as one can readily understand, since his sincerest wish, you see, was to marry a true princess.

One evening the weather became exceedingly unpleasant; there was continuous lightning and thunder and unceasing floods poured from the sky. Now someone rapped on the gate of the castle, and the old king went to open it.

Outside the gate there stood a princess. But, heavens, what she looked like! The water streamed from her hair and clothing; it had quite soaked her shoes and kept oozing from the heels, and as she stood here in the downpour she said she was a real princess.

"Well, we'll soon determine that!" thought the old queen; she said nothing but went into the bedroom, and taking off the entire bedding she laid a pea on the bottom of the bed. She now took twenty mattresses, laid them over the pea, and over the mattresses she piled on twenty feather beds, made of the softest down in existence.

In this bed the princess had to sleep the night. In the morning she was asked how she slept.

"Oh, miserably!" replied the princess, "I could hardly get any rest the whole night, and I do not understand what there was in the bed.

"I was lying on something hard, and my whole body got black and blue. It is a very disagreeable and strange experience!"

Now it could be known to a certainty that she was a real princess, since she had perceived the pea even thru the twenty mattresses and the twenty featherbeds with the softest down in existence. No one but a real princess could possess such wonderful sensitiveness!

After this the prince married her; for he knew, you see, that his wife was a real princess. As for the pea, they put it into the king's museum. There it is to be found to this day, provided no one has stolen it.

Translated from the Danish by a Dane.

Notes

Like all of Hans Andersen's inimitable fairy tales, the present selection, in reality a fine piece of satire, contains a moral by no means put out of date by the external collapse of pseudo-aristocracy thru the world. While the style is of the simplest, it is for that reason the more worthy of study and imitation.

edziĝi kun: the Ekzercaro gives both **edziĝi kun** and **edziĝi je**. But it is well to remember the teaching of Ekz. sek. 29: "Estas bone

uzadi la vorton "je" kiel eble plej malofte." — **devus**: tho modernly **devus** is used for "ought," the word has here the sense as in FK. 35 and 288. — **ĉagrena**: neither "disappointed" nor "grieved" quite covers this word—it is a mixture of both. **Ĉagreno** has no exact Eng. equivalent: we can catch its sense from Kabe's definition: "malĝojo, kaŭzita de perdo aŭ de nerealiĝinta espero"—the latter cause applying to the present instance. — **ja**: note the quasi-idiomatic force of this particle. — **Ian vesperon**: one would expect **iun**, as no idea of quality (as in the **ia-tia-kia** series) is involved; but see Fruictier's Sintakso sek. 102, where it is said, "Por 'iu, neniŭ', estas uzataj pronome: 'ia, neniŭ', simple adjektive." — **fulmadis**. . . . **tondris**. . . . **senĉese falis**: as in the best style, affixes are not used superfluously: the idea of "continuation" being once expressed in the first verb **fulmadis**, and continued in the adverb **senĉese**, the **-ad-** is unnecessary in the succeeding verbs. — **la maljuna reĝo**. . . . **la maljuna reĝino**: the king functioning as his own gatekeeper, the queen as her own chamber-maid, strikes us not merely as the whimsical incongruity of a child's tale, but as a subtle touch indicating that the point of the story is not the soft living of those in royal courts, but the snobbish ideals of the mollycoddles of ordinary society. — **ripozigis**: note the force of **-iĝ-**, implying a tossing and turning before "getting into" any sort of repose. — **bruna kaj blua**: lit. "brown and blue," tho Eng. idiom of course demands "black and blue." Cp. Revizoro 19: **li al ĉiu batas bluaĵojn sub la okuloj**, "he gives everyone a black eye." — **okazo**, "an experience," a rare use of the word: it generally = either "case, instance," or "opportunity." — **Neniŭ ol**: usually **neniŭ KROM** (Ekz. sek. 26). — **Tie**. . . . **forŝtelis**: the idea of putting this precious pea on exhibition and souvenir-hunters scheming to carry it off is a final exquisite hit at the inverted values of "high society."

KIAM NENIA STELO BRILIS

J. F. M.

Oni aŭdas ofte en Norda Ameriko, ke la angla lingvo sufiĉas ĉi tie. La ne-anglan fremdulon, la ruĝhaŭtulon, la eskimon oni ne devas konsideri. "Ameriko por amerikanoj!" Ĉar amerikano estas, "deveninto de eŭropanoj naskitaj en Ameriko," laŭ vortaro usona. Nu, ĉu por ĉiu "vera" amerikano sufiĉas la idiomato de la Avona bardo? Ho! estas esceptoj; aŭskultu:

Unu pluvan nokton, dum mi rapidis tra la senhomaj stratoj, mal-kontenta ĉar mi ne povis fumi pro la vento, mia irado konvergis kun tiu de strange aspektanta knabino, kiu haltis antaŭ mi, momenton min observis, kaj tiam mirigis min per demando en la franca lingvo. Vane mi penis kompreni. Al miaj anglaj vortoj, ŝi nur nee skuis la kapon. Sed per lumo el butikaj fenestroj mi vidis ke la timigataj okuloj petegis . . . kion? Moneron mi prezentis, kaj kvazaŭ tio estis insulto, ŝi tuj forlasis min, la malseka nokto ŝin englutanta. "Esperantistino?" mi vokis post ŝi, lastmomente, sed ŝi ne paŭzis.

Sen preparo vesta por tia vetero, sen ombrelo, sen ĉapelo, afliktata francino en urbo kie ne estas francoj; sola, senparola. . . . kia povas

esti ŝia sorto? Tiel mi meditis kiam hejme en varmeco kaj komforto, dum la petantaj vortoj de tiu dolĉa voĉo, nekomprenablaj sed tamen muzikaj, daŭre sonadis ĉe mi, kiel kanto kiun oni ne povas forgesi. Se nur la malfeliĉulino estis lerninta, eĉ iomete, nian lingvon, tuj ŝi estus trovinta simpatiajn geamikojn, anstataŭ esti ekstere travaganta la ventegan nokton.

“En noka hor’ malhela,
Se pluvo falas dense,
Aventuro la plej bela,
Okazas ĉe mi... pense.”

Pri la vagantino mi estis ankoraŭ revanta, kiam la telefono eksonas. Tio estis konato Slocum. Li diris ke stranga knabino, kiu ne povas paroli angle, estis entrudinta sin en lian domon, kaj insistis resti tie. Ŝi estas francino, li pensis; kaj li volis ke mi venu por interparoli kun ŝi. Ĉar mi iom legas tiun lingvon, Slocum supozis ke mi helpus en la afero. Kvankam mi sciis ke ne, mi tutsame rapidis al li. Allogis min la mistero kiu envolvis tiun knabinon...kompreneble ne estis du tiaj en la urbeto.

Estis efektive la sama. Kaj lace malklinanta sed kun lertaj okuloj, sur sidĉambra kanapo de mia konato, ŝi estis des pli interesa, mistera kaj bona por vidi, ol kiam mi unue ŝin renkontis en la strata duonlumo. “Belan kunulinon vi kaptis,” mi diris.

“Vera lilio de Libano! Jen mia mizero!” respondis Slocum. “La edzino estas for, mi restas sola en la hejmo, jam estas preskaŭ noktomezo, kaj ĉi tiu ina enigmo arbitre decidis resti ĉe mi.”

Duan fojon mi penis kompreni ŝian francan, kaj sensukcese. “Morgaŭ oni povos trovi iun kiu kapablos paroli kun ŝi. Intertempe, permesu ke ŝi dormu ĉi tie,” mi sugestis.

“Ha! la kutimo tion ne sankcias,” lakone respondis Slocum; kaj tiu morala homo komencis perforte eltiri la knabinon el sia virta domo. Komike estis vidi la korpulentan Slocum, anon sen riproĉo de la eklezio presbiterisma, en barakto kun tia nimfo vigla. Li atingis sian celon, kvankam ne facile; kaj sen ia adiaŭa ceremonio, eljetis la gastinon en la bruantan nokton.

“Honte estas! Eĉ barbaroj respektas ĉies rajton de azilo,” mi rimarkigis, kiam li ree ensaltis tra la pordo, gracie kiel makropo. Tra fenestro ni elrigardis, kaj vidis ke la strangulino sidas sur lia porda sojlo, senprotekta en la malagrabla malsekeco. “La diablo prenu vian reputacion! Havu koron, Slocum. Denove enlasu ŝin,” mi aldonis.

“Aspektas kvazaŭ ŝi estas en granda intimeco kun mi. Kion pensos la najbaroj?” diris Slocum, melankolie. Kaj tuj pro sia bonfamo li rapidis malfermi denove por la knabino. Forverŝante la pluvajn gutojn, ŝi revenis al la kanapo, montrante nenian ofendon, tamen ne sen iom da virina konfuziĝo natura en ŝia situacio malfeliĉa. “Ŝi estas imuna al sugestio pri kio decas,” Slocum diris. “Nu kial ŝi elektis ĝuste mian domon por sin instali? Kiel mi tion klarigos al la edzino, kiu revenos morgaŭ, se mi ne povas tion fari al mi mem. Kia pozicio!”

“Aŭ via persono allogas ŝin, aŭ iel via domo,” mi respondis. “Mi iom rigardos la doman fasadon.” Prenante ombrelon, mi la pordon malfermis, kvankam ne serioze opiniante ke mia intenco ian solvon alportos. Tiam, en lumo strianta eksteren, mi ekvidis lilian bedon tie en la korto, stelforma bedo. Kontraŭ fundo de sarkita, bruna tero, ĝia senflora amaso prezentis grandan verdan stelon.

“Jen la simbolo de la amikoj de Esperanto.” Mi ekparolis tiu-okaze en la lingvo kiu, kaj anime kaj kore, kunligas tiujn geamikojn tra tuta la mondo. Tuj ekkrio ehois el la ĉambro malantaŭ mi. Ĝi venis el la buŝeto de la vizitantino nebonvena. Si estis staranta, rigardanta al mi per larĝe malfermitaj okuloj.

“La simbolo de la amikoj de iu kiu esperas,” ŝi ripetis malrapide, kaj efektive en Esperanto parolanta kun akcento nepre ĝusta. “Sinjoro, mi vin komprenas, sed kiel tio povas esti? Kiel estas ke vi uzas la vortojn de Fratino Madeleine-Celeste?”

“Kiu? Vi parolas la lingvon Esperanto? Kial vi jam tion ne diris?”

“Jes, mi komprenas vin tute, esceptante vian uzon de ‘Esperanto.’ Fratino Madeleine-Celeste instruis ke tia vorto devas signifi, iu kiu esperas. Kiamaniere estas ke vi konas lingvon kiun ŝi elpensis? Kiam antaŭ tiu ĉi konstruaĵo mi ekvidis la verdan stelon, la simbolon de bonfaranto, per kiu mi ĉiam povas trovi helpon en bezono, laŭ ŝia diro, mi estis vere tiam iu kiu esperas, sed mi esperis renkontiĝon sole kun ia francan parolanto.”

Intuitive mi ekvidis iom la lumon. Tamen, mi ne postulis de la knabino ian klarigon ĝuste tiam. Mi subite konsciis nur ke samideano bezonas helpon... mistero povas atendi. Mi tuj sciigis al ŝi ke mi estas la serĉita bonfaranto; kaj ke mi foriros por alporti sekajn vestojn, varman manĝon, lui ĉambrom por ŝi en hotelo, aŭtomobilon por veturigi ŝin tien, ktp. Ŝi estas Esperantistino! Kia diferenco do! Oni ne povus fari tro multe por ŝi.

Feliĉa igis ŝin la kompreneblaj vortoj; kaj serenigis la koron de Slocum, mia subita agemeco... la kristanismo staras por universala amo inter homoj, sed estas cirkonstancoj kie la esperantismo pli efikas.

Ne ĝis la sekvanta tago mi aŭdis plene la historieton de Katrino Lajoie, per kiu la stranga situacio en kiu mi trovis ŝin klariĝis. Dank’ al ŝi, mi povas sube meti la faktojn en ŝiaj propraj vortoj. Mi aldonas nur ke depost tiu nokta renkontiĝo, mi neniam forgesas porti nian “simbolo de bonfaranto.” F-ino Lajoie nun havu la parolon:

[Daŭrigota]

To readers: How does Miss Lajoie explain her having acquired the language without learning its name? Send in your solution, in Esperanto, or see our next instalment.

Atentu ke internacia lingvo vivos nur per uzado

Esperanton uzu parolante, studu legante, kaj ne fuŝu skribante.

—el Sennacieca Revuo

PAROLEJO

En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulatej
 In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required

(The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head; the facts are on the authority of the person signing. NOT open for any articles upon Esperanto subjects proper.)

* * * * *

USONAJ ŜPARATESTOJ

La Kasa Fako de Usono proponas al la popolo aĉeton de (U. S.) Treasury Savings Certificates (Usonaj Ŝparajaj Atestoj) po 25,100, kaj 1,000 dolaroj. Tiujn novajn bilojn oni eldonas laŭ diskonto, tamen je fiksitaj prezoj de 20, 80, kaj 800 dol., kun pagdato kvin jarojn post vendodato. Se oni retenos ĝis pagdato oni gajnos procentajon de 4½% po jaro, alkalkulatan jarduone; se ne, nur 3½%. La biloj estos ĉiuj registritaj por asekuro kontraŭ perdo aŭ ŝtelo.

Oni daŭrigos la vendadon de \$1. ŝparajaj markoj senprocentaj ĉe la poŝtoficejoj, kiel oportune por amasigi sufiĉe por aĉeti la novajn bilojn per la markoj. Eldonado de malgrandaj militaj atestmarkoj estas maldaŭrigita, sed oni akceptos ĉi tiujn aŭ por la novaj atestbiloj aŭ por amortizo laŭ la presita valoro je la poŝtoficejoj.

[mallongigita resumo, laŭ peto de P.O. Fakestro]

* * * * *

Alvoko de Siberia Apartaĵo de la Ligo de Tut-pacifika Oceano pri helpo al malsatantoj de Ruslando kaj Siberio.

Ruslando malsatas.....

Dek centraj kaj apudvolgaj gubernioj ne kolektis de kamparo eĉ bezonatan kvanton da semoj por la semado dum sekvanta jaro.

Jam nuntempe loĝantaro sin nutras per herbo, bero, kaj arbŝelo; miloj da senkulpaĵ virinoj kaj infanoj pereadas de malsato.

Mizero—ne estinta ankoraŭ dum la tuta historio de la homaro pro sia grandamplekso!

Malsatantoj bezonas tutmondan helpadon, milionojn da dolaroj kaj milionon da pudoj de provizaĵo.

Siberio, estinta grenejo de Ruslando, tiomgrade suferas mem de malbona rikolto, ke eĉ al ĉi-tiea loĝantaro minacas la morto de malsato, precipe al malsata popolamaso, kiu el Ruslando nun moviĝas ĉi-tien por serĉado de manĝaĵo, pleniginte per si la tutan Okcidentan Siberion.

Por Siberio la mizero devas esti ankoraŭ pli granda, ĉar de Okcidento siberia loĝantaro ne povas ricevi provizajon pro malsateco de eŭroprusa loĝantaro, kiu mortante de malsato ne preterlasas grenajn transportojn, se eĉ ili estus veturigataj per tankoj kaj kirasvagonaroj.

Por Siberio restas sola vojo, per kiu ĝi povus ricevadi provizajon, nome: trans Vladivostok per fervojo.

Siberia apartaĵo de ligo de tut-pacifika-Oceano en urbo Vladivostok, unuiginte kun ĉi-tieaj apartaĵoj kaj filioj de aliaj internaciaj organizaĵoj kaj kun "Apudmara komitato de societaj organizaĵoj de urbo Vladivostok por helpado al malsatantoj de Ruslando" sin turnas al vi, loĝantoj de pacifik-oceanaj landoj kun varmega alvoko:

Sendu al ni en urbon Vladivostok, al oficejo de komitato de Siberia Apartaĵo (Pan Pacific Union) senprokraste grenon, monon, kaj medicinan helpaĵon.

Mem organizu komitatojn por savado de malsatanta rusa popolo!

Kredantoj! ne forgesu la plej altajn fundamentojn de humaneco kaj amon al proksimuloj!

Homoj de scienco kaj arto, kiel pereige influos ekonomia detruaĵo de Ruslando je bilanco kaj amplekseco de tutmonda vendokampo.

Laborista klaso! vi, kiu mem bone konas malsaton kaj mizeron, subtenu nian laboran popolon en tiu-ĉi terura momentó.

Sciu, ke ĉiu oferaĵo via estos senprokraste liverita de ni laŭ via destino.

Oficialaj reprezentantoj viaj ĉi-tie en urbo Vladivostok, kiel honoraj komitatoj de Siberia Apartaĵo de Ligo de Tut-pacifika Oceano ĉiam havas eblecon kontroli nian agadon.

Prezidanto: Profesoro, Doktoro de civila juro S. P. Nikonov

Vic-Prezidanto: Profesoro-ekonomisto A. N. Petrov

Komitatoj: Profesoro de internacia juro M. P. Golovaĉev
Profesoro orientalista A. V. Grebenŝĉikov

Kasisto: A. K. Zabego

Sekretario: G. I. Ĉertkov

KRONIKO ENLANDA

Detroit, Mich.—Nia grupo efektive funkcias. 65 membroj. kurso kunvenas ĉiuvendrede; ĉiumarde kunvenas la spertuloj por legi kaj paroli, kaj ekzerciĝi en nia lingvo.

Rockford, Ills.—Fondiĝis la "Esperanta Grupo Internacio" kun 9 membroj. Sekretario estas S-ro E. Rundquist, 1217-16th Ave.

Boston, Mass.—Oni prokrastis la Dec. 31a barĉo al Jan. 7. Vizitis Bostonon lastatempe D-ro Cottrell, estro de la I. R. C. komitato pri internacia helplingvo.

Toronto, Can.—La American Association for the Advancement of Science (Amerika Asocio por Antaŭenigo de Scienco) en ĝia kunsido de decembron la 30a pritraktis la urĝan bezonon de internacia helplingvo, kaj nomis komitaton por sin informi pri tio.

New York, N. Y.—"Harmonio" estas vigla kaj interesplena. Barĉoj la 2an sabaton ĉiumonate je restoracio Omar Khayyam, 34 W. 35th St. Spertegaj kantistoj ĉeestas: S-ro Breslaw kaj F-ino Stimer studas E. Prezentaĵoj muzikaj de S-ino Razrazovska kaj S-roj George Saville, Benjamin Reich, kaj Morris Bortnik ĝuegataj. Paroladoj de S-roj Morton, Arnold, Silbernik, Sayers, Sussmuth, kaj Klačin, kaj de Finjo Tereseta Gascon-Ferrer; ankaŭ anglaj propagandaj paroladoj de S-ino Ford, S-ro Levine, kaj D-ro Seeley. Je la piano oni ĝuas aŭdi F-inon Spector, je gitaro S-ron Levko, kaj F-inon Freedman, kiu ludas la dancmuzikon. Multaj Harmonianoj renkontiĝas ĉiumarde.

—Esperantista Laborista Centro, 323 Second Av., estas S. A. T-anoj, celantaj enkonduki Esperanto'n kaj radikalismen. La sindikatestroj de la bakistoj decidis lernigi E. al sia tuta 4,000a membraro.

Klasojn ĉiuvespere instruas F-ino Rosenthal, S-ro Schultz, kaj S-ro Saville.

—La Ferrer Modern Sunday-School, 150 gejunuloj 6- al 18-jaraj, enkondukis Esperanto'n kiel instruobjekton kaj per kantoj.

—La Rand School of Social Science denove malfermis kurson en Esperanto bonsukcese.

Habana, Cuba.—La Grupo Esperantista de la Asociacion de Dependientes del Comercio estas dissendinta belan salutkarton kristnaskan.

Vancouver, B. C.—Viglega Esperantista movado. La "Sun", Decembron la 18an presigis tradukon de letero el malsata Rusujo.

BEST TRANSLATION

Kiam en 1911a Ĥinujo ekstaris* registaron, ne ekzistis en ŝia* lingvo vortoj esprimantaj respublikan formon de registaro.* Bone komprenu* ĉi-tion! Ni havis la idealojn doni* al ŝi,* sed ŝi* ne havis vortojn por esprimi ĉi-tiujn idealojn. Plie, ŝi* havas lingvon malfacile esprimeblan* kiun lertuloj devas studadi multe da jaroj por ellerni. Eĉ klerulo kiel trovigas* Dro. Woods bezonis deĵaran studadon antaŭ ol li povis ellerni ĝin, kaj tiam* ekzistis* vortoj nekomprenablaj.*

Sesdekse jarojn Dro Martin forpasigis* en Ĥinujo. En longa interparolado li konfesis al mi, ke neniam li skribas leterojn en la Ĥina lingvo. Diris li: "Mia skribisto kaj instruisto ĉiam restas ĉe mi. Neniam mi forlasas la* studadon de la Ĥina lingvo." ' Kion vi opinius se post sesdekse-jara studado, vi tiam* ne kuraĝus konfidi vin por* skribi leteron en la Ĥina lingvo al oficisto, sed kontraŭe estas devigata dungi personon fari* tion por vi. Tio devas klarigi al vi la neeblecon de la Ĥina lingvo.

Esperantigita de W. H. Smith
62 No. Main St., Concord, N.H.

* * * * *

ekstar(ig)is; — ĝia, ni ne uzas sekson por landnomoj en Esperanto — regado, ĉu ne? — bone, tamen plibone Enmensigu tion! — mi preferus "por doni"—ĝi, konstante—bone, aŭ malertigan, aŭ malfacile uzeblan, aŭ malfacile esprimivan—en nia kazo "estas" estas la sole prava; pli logike estus "kia estas Dro. W." — ekzistis, kompreneble — komprenataj. — forpasigas, la agado ankoraŭ daŭra (?) — "la" nenecesa — tiam estas prava, tamen mi preferus ja ĉar la tempa ideo ne estas forta — pli klare estus "konfidi ke vi skribu" — mi ne ŝatas "kontraŭe," ĉar ĝi ŝajnas tro forta kaj nenecesa — dungi personon kiu faru tion por vi. (Uzado de nura infinitivo estas ja sufiĉe kutima)

Ni volonte ricevas kritikojn por niaj eraroj—la red. konfesas sin ne ĉiam prava. Oni kritikis "nenion, kiun" de la novembraĵ notoj. Pli ĝuste estus "neniun aĵon, kiun," ĉu ne? Unu demandis pri la formo Usona—tiu estas iom uzata angla vorto, angle elparolata eble Jusona, kun ebla rilata vorto Usonian.

kiu estas el-ekta vorto; kio estas kol-ekta vorto, kaj rilatas pliofte al tuta frazo aŭ ideo, ne al unu vorto klara.

**TO TRANSLATE
THE ISMS**

Individualism: The theory that human action is always guided by the individual's conception of his* personal interest, and that, therefore, human association should be so adjusted that every sane adult person shall be free to do as he* wills, provided that, in so doing, he* does not infringe the equal freedom of others.

Collectivism: The theory that human association must necessarily be controlled by collective organization in order to prevent some individuals from infringing upon the equal freedom of others; that because persons combine to produce some things, the title to such things originates in the will of the collectivity, instead of originating in the exertions of the individuals; and that, therefore, the collectivity should own and operate all the means of production and distribution.

Equitism: The theory of the rational application of individualism to human association; that all titles to exclusive possession originate in the exertion of individuals; and that, therefore, the basing of all exchange of titles to exclusive possession on hour for hour of adult human work will secure and maintain equal freedom and thereby place the Merit Incentive in control of human actions, and thus make unnecessary any exercise of the will of some over others.

—from *The Equitist*.

*The *Equitist* uses here a coined word, "vey", for indeterminate sex, which we have replaced by the customary English.

REALITY

A progressive journal along sure lines, which reaches a class of people who ought to be interested in ESPERANTO, and many of whom would be, if they knew about it in the right way. It favors

ESPERANTO

Let Us Work Together!

One way would be for Esperantists to take

REALITY

the monthly magazine devoted to the elimination of prejudice, religious, racial and class.

Address: **REALITY PUBLISHING CORP.**

17 West 42nd St., New York City